Universala Esperanto-Asocio

**AKTIVULA MATURIGO**

**Estrara Subteamo: MOVADO**

*Estrara Komuniko EKO 2017-08 sendita el Greziljono, la 18an de aprilo.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, listoj kaj unuopuloj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj.



# Jam la dua AMO en la kastelo

Okazis en 2017 jam kvar seminarioj pri Aktivula Maturigo (AMO). AMO 30 okazis en Munkeno kaj AMO 32 en Italio, apud Bergamo, ambaŭ ene de la trejnprogramoj de TEJO kun eŭropa subteno. AMO 31 portis la programon al nova lando, Kartvelio. Nun okazas AMO 33 en la Kulturcentro Greziljono, kun eksplicite eduka temo: "Kiel modernigi la instruadon de Esperanto kun la novaj teknikaĵoj".

La seminarion malfermis la prizorganto de la programo, Sara Spanò, per skizo de la celoj, la enhavoj kaj historio de la programo. Tiu historio montris kiel rapide la programo tutmondigis sin kaj ĝuis grandan deziron. Emfazitaj estis la unua seminario en Hungario en marto 2014 kaj la tiam plejlasta, AMO 31 en Kutaisi, Kartvelio, kie grava enhavero konsistis el FLAM-analizo pri la fortoj, lamaĵoj, avantaĝoj kaj minacoj de la kaŭkaza kaj seminaria regiono. Tio iĝis la sesa tia analizo; la rezultoj aperis detale en EKO-komuunikoj 5, 6 kaj 7.

Post tiu enkonduko transprenis la gvidon Mirejo Grosjean, prezidanto de ILEI, kiu komence diskutigis pri la difino de aktivulo, kun piramido de sciniveloj, en kiu la aktivuloj troviĝas pli supre, plejparte en la movado, sed kelkaj ĉefe en la parol-komunumo sen multa interago kun la tradicia movado. Post tio ŝi rakontis spertojn el la eksteraj rilatoj de UEA en Ĝenevo kaj Parizo ĉe UN kaj Unesko, ankaŭ kun regantoj en kelkaj afrikaj landoj. La sesifermo tuŝis la temojn kiel adapti la bezonojn de la instruado al lokaj kulturoj kaj al la bezonoj kaj kapabloj de unuopaj studentoj. Gravas klarigi aferojn pli ol unumaniere – per vido, aŭdo, rezonado kaj komparado kun akiritaj scioj. Same grava estas strukturi la kurson por ebligi fruan sukces-senton, ekzemple per simplaj paroligaj ekzercoj pere de la neabunda jam lernita materialo.

Dimanĉe kaj marde posttagmeze okazis du ligitaj sesioj pri verboj. La gvidinto, Stefan MacGill petis ideojn, kial la verbo-sistemo en Esperanto estas unuflanke unike facila, kaj kontraste, kial unike malfacila. El tio fluis la konstato, ke la ĝusta rego de la akuzativo dependas je dekomenca lernado de la kategorio de la verboj, kaj ne de la vortordo en frazoj, kiu pli liberas en Esperanto ol en multaj naciaj lingvoj. La dua sesio portis la temon pluen per analizo de la uzado de la produktivaj sufiksoj –ig- kaj –iĝ-, kiuj en multaj naciaj lingvoj ne havas precizan paralelaĵon. Tio spronis debatojn de la plurlanda publiko.

Lunde matene, Mirejo gvidis sesion pri la ecoj kaj kondutoj de bona instruisto. Venis multaj saĝaj proponoj; kelkaj grupanoj estas multjaraj instruistoj. Inter tiuj ecoj estas ĝentileco, afableco, justeco, pacienco, diligenteco, akurateco kaj sentemo. La kvalitoj estas grupigeblaj en tri vastaj kategorioj: scioj (unuavice sed ne nur pri la instrukampoj), inteligento (kapabloj analizi, sintezi kaj indukti) kaj pedagogio (laŭ la greka signifo: infan-akompananto).



Fotoj: SMG

Lunde posttagmeze Aleks André kerne kontribuis al la seminaria temo; li prezentis la komputikajn eblojn lerni kaj lernigi novulojn. Li gvidas kurson en sia lernejo, kaj en la unua leciono prezentis al la studentoj komputile filmitajn salutmesaĝojn el deko da landoj. Kurse uzeblaj kontaktiloj estas retpoŝto, skajpo kaj pli novaj ebloj kiel la elŝutebla apo *Telegramo.org*, babilprogramo sen video. Ĝi subtenas grupojn, do ekz. nur espistoj aŭ dulingvaj grupoj: Eo + alia lingvo. TEJO, la Pola retradio, *Heroldo* kaj Vikipediuloj uzas ĝin. Subtenataj estas skribaj mesaĝoj kun alkroĉataj sonregistroj, baldaŭ voĉe per poŝtelefono, sed ne voĉe per komputilo. *Twitter* havas vortlimon kaj ĉio estas publika. Nova: *Mastodon*: vortlimo 500, informoj ĉe *socia.esperant.io*. *Medium* – simile al Ipernity, sed nur angla - ĉio publika, tri ligiloj fine al rilataj artikoloj. Ligiloj, video, bildoj – pli uzamika interfaco. *Reddit.com/r/Esperanto*: sendi ligilojn al interesaĵoj. Listego kun voĉdoneblo. Kun subreditoj: i.a. 'esperanto' – 7000 E-uzantoj. Funkcias kiel reta ĵurnalo kun (mal)rekomendoj (verda stelo/krokodilo). 'Ekparolu' – registro de geonkloj kaj genevoj, kun ilo por fiksi rendevuojn – projekto de <edukado.net>. Havas kapaciton akcepti pli da nevoj. Duolingo: hispanlingvaj, jam 95 mil vizitintoj, EN pli ol 800,000. Duolingo kursfinintoj → *duolingo.esperanto.net*, por ricevi senpage revuojn de UEA. JA simile akireblas. Jutubo – multaj kanaloj – kompileblas dekoj da parolekzemploj, ekz. landaj salutoj en UK.

Pri la kursoj de Aleks: klubo kun 5-semajna kurso, en liberaj lecionhoroj. 1h semajne. Temoj de la unua sesio: Kio estas Eo, baza strukturo, diru, kio interesas vin.  Teksto en simpla Eo, laŭ franca sintakso kaj rekoneblaj radikoj, kun kolorindikoj por komprenebigi la strukturojn. Posta temo: la nuntempa uzado. Tipa kursnombro 15, 60 entute, do okazis jam kvin kursoj.

Komisiono iris al la franca Edukministerio, kiu permesas per skriba dokumento lokskale eksperimentajn projektojn, kun peto pri komunikado pri la rezultoj.Necesos trovi trejnitajn instruistojn kun rekonataj kvalifikoj (ne tute facila afero!).

Ligiloj por plia studado. Duolingo, lernu.net (25 lingvoj), learn.esperanto.net (Z-metodo), kurso.com.br (ekstereŭropaj lingvoj kiel la hindia). PreVo – poŝreta vortaro. geothe-verlag.com/book2. babadum.com (21 lingvoj) k.m.a.



Mardmatene gvidis Sara, unue per analizo de diversaj aspektoj de la lernprocezo kaj de la ĉefaj lernstiloj (laŭ la modeloj de David Kolb kaj de la t.n. 4MAT): senti, rigardi, pensi, fari. Sekvis trarigardo kaj diskutoj pri la grava rolo de motivigo en la lernado kaj laste konsiloj de Mireille Grosjean, kiel trakti la sentivan temon: kiel trakti parolerarojn. Citindas rilata itala proverbo: “Por majstri fremdan lingvon, unue vi devas masakri ĝin”.

Ĝenerale la posttagmezaj seminarioj altiris pli grandan publikon (ĝis 12 personoj) ĉar tiam ne okazis paralelaj kursoj (nur ekskursoj!).

Sekvos tago kaj kvarono da seminario, kun la konkludoj en la ĵaŭda mateno.

Vortoj: 875.

========================

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj aŭ elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupo aŭ kialo por via ĉeesto en la ekspedolistoj.